



Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)



Feliĉan Novjaron



karaj samideanoj en Jokohamo, kaj en la tuta mondo!

TIEL OKAZIS

LA 42-A ZAMENHOF-FESTO EN KANAGAŬA

*dec., 15, 10h30-15h00

*en la "Internacia Ĉambro" de urbo Odaŭara

<<Ĝenerale>>

La 4 rondoj en la gubernio Kanagaŭa havas ĉiujare komunan Zamenhof-Feston, kaj ĉi-jare ĝin gastigis la Esperanta Klubo en Odaŭara. Entute ĉ. 50 samideanoj ĝuis la Feston.

Malfermis la feston s-ro Yatabe Takamitu el Odaŭara, kaj salutis s-ro Okutu Sintaroo el Odaŭara, kiel la gastiganta rondo. Post "La Espero" kunkantita laŭ gvido de s-ro Makino Mituo, estis sinsekvaj raportoj de la 4 rondoj, respektive de Odaŭara, Kaŭasaki, Huzisaŭa kaj Jokohamo (Jokohama). Estis prezento de novaj eldonaĵoj kaj aliaj libroj, vendataj en la angulo de la salono.

Per bildoj sur ekrano, estis prezentita la Kastelo Odaŭara, fare de s-ino Oki Mayumi – vi legos kaj vidos kelkajn el la bildoj en tiu ĉi numero de La Novaĵoj Tamtamas.

Sekvis korusado de la grupo, konsistanta el korus-amantoj de Jokohamo kaj Odaŭara, laŭ gvido de s-ro Makino. Raportis pri Japana

Esperanto-Instituto (JEI) kaj la 100-a Japana Esperanto-Kongreso en Tokio, s-ro Suzuki Keiichiro, la prezidanto de JEI, kaj aldonita estis informo pri la 7-a Azia Kongreso de Esperanto en Israelo.

Venis tagmanĝa ripozo. La Festo mem ne preparis tagmanĝon, sed la ĉambro estis je dispono al manĝado de mem kunportitaj lunĉoj ktp. Fone de la ĉambro estis la libroservo.

<<Prelego>>

De 13h30 ĝis 14h45 estis japanlingva prelego de novelisto, s-ro Mamiya Midori, juna esperantisto. La prelego estis malferma al la urbanoj de Odaŭara, kaj fakte 4 neesperantistoj ĉeestis. S-ro Mamiya estis honorita per japana literatura honorado per novelo "Too-no-naka-no-onna" (laŭlitere, virino en la turo), kaj subtitolita "Turvirino" en Esperanto.

Li resumis sian vidpunkton pri literaturo, rakontis pri renkonto kun Esperanto, kaj parolis i.a. pri sia sperto partopreninte la Universalan Kongreson kaj la Internacian Junularan Kongreson en Vjetnamio en la lasta somero. La sperto donis ŝanĝon al lia esperantisteco, pro praktika apliko de la lingvo kun alilandaj esperantistoj.

■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti

■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458

■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>

■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

Post la prelego, la verda standardo estis transdonita al la membro el Kaŭasaki, kiu okazigos la Zamenhof-Feston en 2013, kaj post “La Tagiĝo”, oni fermis la Feston.

<<Ekskurso>>

La pluvo en antaŭtagmezo jam ĉesis, kaj interesitoj el la festintoj havis promenadon al la kultura heredaĵo, japaneska domo nomata *Seikantei*, irante laŭlonge de la Kastelo de Odaŭara. Tiu domo estis ripozdomo de altrangulo antaŭ la Dua Mondmilito, kaj nun ekspozicie vizitebla.

<<Bankedo>>

Poste, pluraj el la ekskursintoj vizitis japaneskan restoracion por bankedi, de la 17a ĝis la 19a horo.

LA JARFINA FESTENO

*dec., 22 vespere

*en la ĉina restoracio *Hukuyooken*

Ĉeestis entute 21 personoj. Iuj venis post la lasta lernokunsido de la jaro okazinta en la ĉambro de la Literatura Muzeo, dum aliaj venis ĝuste por ĝi. Dum sinsekvo de la ĉinaj pladoj, sekvis sinprezento de ĉiuj. Kelkaj el ili montris sian talenton, jen en kantoj, en ludo de kveno (sudamerika fajfilo), gitaro, okarino, en deklamado. Inter alie, s-ro Makino eĉ “gvidis” kiel bone eligi voĉon por bone kanti.

NIAJ PLANOJ

☛ EKSTER LA REGULA KUNVENEJO

JARKUNVENO DE NIA RONDO

*jan., 27, 13h00-17h00, en “Tikyuu-simin Kanagawa-Plaza”, proksime al la Stacidomo Hongoodai

La jarkunveno de Jokohama Esperanto-Rondo estas la plej supera decid-organo de nia rondo, okazanta unu fojon jare.

Jene estas la plano, de 13-a horo.

① Malfermo / ② Eleko de la kunvena prezidanto kaj protokolanto / ③ Saluto de la Prezidanto / ④ Raporto pri la 2012-a agado kaj kaso / ⑤ Eleko kaj nomumo de la estraranoj kaj komitatanoj / ⑥ Proponado pri la 2013-a agado kaj buĝeto, kaj aprobo / ⑦ Fino de la diskuta parto.

Sekvos la 2-a parto, retrorigarde pri la 45 jaroj de la agadoj de Jokohama Esperanto-Rondo, babilado kun fotoj. La fino estos la 17-a horo.

☛ ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

*Regulaj Klasoj en sabato: Klaso por legado de “Tra dezerto kaj praarbaro”, Klaso por legado de “Vivo de Lanti” / Jokohama Salono / Rudimenta kurso

*Regula Klaso en merkredo.



Speciala artikolo pri la Kastelo de Odaŭara

okaze de la zamenhof-festo, en la urbo Odaŭara, decembre de 2012

La urbo Odaŭara


La urbo troviĝas pacifik-borde en la gubernio Kanagaŭa, meze de Japanio. Vidu la skizan mapon. Ĝi estas historia urbo, kun la kastelo Odaŭara en la urbomezo.

La kastelo Odaŭara

Ĝenerale, kastelo en la japana mezepoko estas dividita en tri partojn per fosaĵo kaj ŝtonaj defendmuroj. Tiuj estas *Honmaru*, *Ninomaru* kaj *Sannomaru*. *Honmaru* (la ĉefa ejo) estas la plej grava sidejo kaj troviĝas kastelturo. *Ninomaru* →

(la dua ejo) estas la kastelestra loĝejo, kaj parte oficejo. En *Sannomaru* (la tria ejo) troviĝas loĝejoj de gravaj ministroj.

Ĉi tiu bildo (Bildo 1) montras la centron de la kastelo Odaŭara en plej bontenita tempo frue en la 18-a jarcento. En la 1703-a tertremego, preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj de la kastelo detruigis kaj forbruliĝis. Sed ĝi rekonstruiĝis post tri jaroj kaj staris kiel simbolo de Odaŭara ĝis forigo de kastelo en 1870-aj jaroj, pro la nova politika situacio.



1

Nun ni povas vidi kastelturon kaj tri pordegojn. Do, ni vidu kulturajn heredaĵojn.

La pordego Umadaŝimon

Jen estas foto farita en aprilo 2012, kun ges-roj Larsson el Francio (bildo 2), antaŭ la pordego *Umadasimon* (bildo 3). Ĉi tie troviĝis ĉevalejo. Tial oni nomis ĝin la pordego *Umadaŝimon*, t.e. ĉevalo-eliga pordego. Ĝi situas fronte al *Ninomaru*. Kiam oni sendis trupon por batalo, oni vicigis ĉevalojn ĉi tie. Ĝi estis rekonstruita en






2009-a jaro, uzinte la saman konstruan teknikon kaj strukturon kiel antaŭe.

Enirinte la pordon *Akaganemon* en la bildo 4, la vojo tuj kurbiĝas je angulo de 90 gradoj por ke malamikoj ne povu antaŭeniri rekte, kiel en la bildo 5.



Ĉi tio estas tre grava strukturo por gardi kastelon kontraŭ la atako de malamikoj. Oni nomis tian strategian strukturon *Masugata* t.e. kvarangula korto. Vi povas vidi triangulajn aŭ kvarangulajn truojn (bildo 6) de muro. Kiam malamikoj invadis ĉi tie, defendantoj pafis per pafiloj tra la truoj. La surfaco de la pordo estas kovrita de kupro (bildo 7), tial oni nomis ĝin *Akaganemon*, nome, pordo el kupro. Kolono kaj pordo estas farita de *hinoki*, nome, japana cipreso (ankaŭ la bildo 7). Trabo estas farita de unu granda pinarbo (bildo 8).



La arbego podokarpo

Ĉi tiu podokarpo (japane: *inumaki*) estas natura memoraĵo (bildo 9). La arba aĝo estas 600 jaroj. La tordita trunko aspektas bela.



Eĉ se la antaŭaj du pordoj detruigis, ĉi tio estu la lasta pordo por defendi la kastelon. Ĝi estis konstruita plej forte kaj grande el la pordegoj. Apud la pordo staris pinarbo. *Tokiŭagi* signifas ĉiam verdan koloron, kaj simbolas pinarbon. La kastelestro esperis, ke la kastelo staru eterne kiel la pino. Tial oni nomis ĝin *Tokiŭagimon*. Tiu pinarbo vivas 400 jarojn. Nuna pordego estis rekonstruita en la jaro 1971.

Kastelturo

Ni atingis la placon antaŭ la kastelturo (bildo 11). Ĉi tie troviĝis palaco (*honmarugoten*). Oni diras ke, kiam *Tokugaŭa Iemitsu* vizitis ĉi tien, li tranoktis en la palaco tri fojojn. Nuna kastelo estis rekonstruita en la 1960-aj jaroj kiel la memora afero de la 20-a datreveno de la urbo Odaŭara, surbaze de la desegnaĵo kaj reduktita modelo farita de ĉarpentistoj en Edo-epoko. Ĝi estas betona konstruaĵo, kiu konsistas el 3 tavoloj kaj 4 etaĝoj. Ĝi estas 38 metrojn alta de la grundo. Interne de la kastelo troviĝas muzeo kaj oni povas vidi historiajn objektojn.

La pordego Tokiŭagimon

Ĉi tio (bildo 10) estas la pordego *Tokiŭagimon*.



Ni grimpu sur la plej altan etaĝon, kaj ĝuu la panoraman pejzaĝon de la koridoro (bildo 12). Jen estas sceno de la plenflorantaj sakuroj vidataj de supre (bildo 13).

12



14



13



Monto Iŝigaki-Jama

En la fono de la bildo 14 estas la monto *Iŝigaki-Jama*. Kiam *Tojotomi Hidejoŝi* atakis la kastelon Odaŭara, li metis sian tendaron en la monto *Iŝigaki-jama*. Vidinte abrupte konstruitan kastelon sur la monto, la kastelestro de Odaŭara el la familio Odaŭara Houĝo treege surpriziĝis, kaj perdis batalvolon, kaj malvenkis en la batalo. Ĉu iu spektis kinon, “*nobou no siro*” (=la Kastelo de Nobou) japane, kiu estis prezentita lastatempe? Temas pri unu el la filiaj (satelitaj) kasteloj de la kastelo Odaŭara, kaj *Iŝida Mitunari* atakis ĝin. Ĝi estis nur unu sola kastelo, elteninta el la ses filiaj kasteloj de la kastelo Odaŭara. Sed laŭ la malvenko de Odaŭara, oni devis evakui la kastelon. Post la batalo, la kastelo Odaŭara apartenis al *Tokugaŭa*, la ŝoguna familio.

klarigo : Oki Mayumi
fotoj : Okutu Sintaroo

89-a LEGOKUNVENO

En la 1-a de decembro okazis legokunveno de "Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo" de Tibor Sekelj. 8 rondanoj donis sian impreson. Ĉi tie aperas esperant-lingvaj impresoj.

Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo

Mizro Iwaya

Tiu ĉi historio estas fikcio. Sed la aŭtoro fakte ekspediciis al Mato Grosso, profunda okcidenta ĝangalo en Brazilo. Tie li pasigis unu jaron en 1946. En la sama jaro li eldonis ĝian detalan raporton kun la titolo "Tra lando de indianoj". Post 33 jaroj, en 1979, li verkis novan libron "Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo" en la sama scenejo. Mature rafinita verko; 33 jaroj estis sufiĉaj al li por remaĉi kaj kompaktigi la okazaĵojn en la ĝangalo. La rezulto estis sufiĉe interesa alivestaĵo.

Mi legis ankaŭ precedencan "indianoj" kaj trovis ke la nova libro estas kremo el la malnova. La fakto estas ke la ekspedicianoj renkontis multe da danĝeroj kaj malfacilaĵoj, sed la nova libro prezentas nur interesan historion el ĝi. La aŭtoro vojaĝis en ŝipeto en la ĝangala rivero de Brazilo. Tiam la ŝipeto koliziis kontraŭ riverfunda roko kaj fendiĝis. Trideko da pasaĝeroj estis forlasitaj

senhelpe en la ĝangalo. Tiam aperis Kumeŭaŭa, indiana knabo, kaj helpis ilin. Li kaptis fiŝojn kaj bestoj per lerta ĉastekniko. Li trovis kaj rikoltis fruktojn kaj eĉ mielon, kies ekziston la aŭtoro tute ne konsciis. Li instrukiis al la pasaĝeroj kiamaniere ili povas tordi ŝnuregon el palmo por savi la ŝipeton. La knabo estis ĉiopova heroo kaj lia saĝo brilis en la ĝangalo. Aldone, li estis ĝentila kaj helpema! Danke al li la ŝipo ripariĝis post tri tagoj kaj la pasaĝeroj povis daŭrigi la vojaĝon sekure. Ĉiuj adiaŭis la knabon kun elkora danko.

Mi devas aldoni ke ĝia japana traduko eldoniĝis en granda kvanto; 300 miloj da ekzempleroj. Ĝi estas rekorda nombro en esperanta eldono. Tiom interesa estas ĝia historio. Ankaŭ mi konsentas.

Impreso de la libro "Kumeŭaŭa"

SIBAYAMA Noriko

Unue impresis min la bindmaniero de la libro. Lastatempe mi malofte renkontas fadene binditajn librojn, tamen ofte vidas glue binditajn librojn, kaj en tiu okazo, mi devas lukti por teni etendi la paĝojn legotajn. Male fadene binditaj libroj facile etendiĝas. Pro tio ni povas legi senstrese.

Mi sentas, ke "Kumeŭaŭa" estas tre oportuna fabelo, ĉar tie neniu malica homo aperas kaj nenia konflikto okazas. Bonkora kaj sperta knabo Kumeŭaŭa subite aperas en la sceno de ŝippereo, kaj sindone helpadas la pasaĝerojn, ĉasante manĝaĵojn, farante fortan ŝnuron el fadenetoj de palmo, rikoltante aŭ frukton aŭ

mielon, ktp. Krom tio li tute ne intencas ricevi rekompencan. Unu el la pasaĝeroj kolektis monon el ĉiuj kaj donacis ĝin al Kumeŭaŭa sed li kaŝe redonis. Al la kapo de civilizito venas nur tia ideo, nome rekompenci per mono pro granda ŝuldo. Ĉi tie mi rimarkas, ke mi mem estas tia civilizito, ĉar mi ankaŭ min kontentigos per monofero al la knabo en tia sceno.

Kumeŭaŭa havas rondajn markojn sur siaj vangoj kiel signo de plenaĝulo. Por fariĝi plenaĝulo diversaj severaj ekzamenoj obstaklas antaŭ (ge)knaboj. Sed ĉu ili ĉiuj povas sukcesi en tiaj ekzamenoj? Nepre estas defalintoj, mi

opinias. Kiel traktas ilin la tribo?

En la libro sinsekve aperas nekutimaj epizodoj specialaj en Amazono. Mi sentas spekti diversajn dokumentajn filmojn pri ĝangalo, precipe plej vidindajn scenojn. Interalie interesis min, ke soldat-formikoj fariĝas kvazaŭ unu granda bulo kaj transiras riveron. Mi neniam rigardis tian scenon en filmo, do iam mi deziras.

En la libro multaj bildoj helpas min kompreni la enhavon. Precipe al mi utilis la ilustraĵo de piedsignoj de diversaj bestoj sur riverbordo. Se la bildo mankus mi ne klare kaptus la scenon.

En la legokunveno s-ro Koyama montris brelokon aĉetitan en Brazilo okaze de iama UK. Ĝi estas el vera piranĵo. Ankaŭ ĝi helpis nian komprenon. Dankon!



breloko el aŭtentika piranĵo

La praarbaro kaj la indiĝenoj de Amazono

TANIGAWA Hiroshi

En la libro “Kumeŭaŭa – la filo de la ĝangalo” (Tibor Sekelj) 12-jaraĝa indiĝena knabo savis ĉirkaŭ 30 blankulojn inkluzive de virinoj kaj infanoj, senespere evakuiĝintaj ĝuste en la mezo de la amazona ĝangalo.

“Kumeŭaŭa” estas la nomo de la amazon-indiĝena knabo. Li mirige scipovis kapti diversspecajn birdojn, bestojn, fiŝojn, kiujn li provizis al la evakuitoj senmanĝe izolitaj en ĝangalo. Krome, kaj fine, li instruis al la evakuitoj rimedon por revivigi la grundiĝintan ŝipon.

Oni demandis la knabon; “Via tribo ne ŝatas la blankulojn, kial do vi venis helpi nin?” Kumeŭaŭa respondis; “Maljuna Maloa diris: “Kiu helpas al homo en malfacilaĵo, helpas al si mem.”

Estas dirite ke, ĉi-supra ĉarma novelo tre verŝajne reflektas la realajn spertaĵojn de Tibor Sekelj, kiu kunvivis kun amazonaj indiĝenoj en la profundo de la amazona regiono dum ĉirkaŭ unu jaro. (eble en la 1948-9aj jaroj aŭ ĉirkaŭ tiam)

Mi atentis iomete pri la aktualaj statoj de la amazonaj indiĝenoj.

Minami Kenko (南研子) skribis “2000; Ama-

zono, Mesaĝoj de la Indiĝenoj”, “2006; Amazono; La Voĉoj de la Spiritoj en la Praarbaro”.

“Multaj indiĝenoj suferege vivas en la plej malsupra socitavolo, perdinte sian propran lingvon kaj la kulturon. La enmigrintoj invadis la landon, kie la praloĝantoj delonge vivis. La vivo de la praloĝantoj estis fatale detruitaj. Tia fenomeno okazis ne nur en Brazilo, sed diversloke en la mondo, praloĝantoj pereis aŭ nun pereantaj fare de la enmigrintoj.”

Minami Kenko starigis NPO, RFJ (*Rainforest Foundation, Japan*, 1989) kun la celoj (1) protekti la praarbaron de Amazono. (2) protekti la homajn rajtojn de la amazonaj praloĝantoj.

Kaj nun Vikipedio komentarias:

En Brazilo senorda terekspluato de praarbaro akcele rapidiĝis depost la 1970-aj jaroj. La konstruado de vojoj, digoj, minoj, kaj agrikulturo de fekundigo per cindrigo akcelis la detruon de la praarbaro en Amazono. Post la problemo de BSE-bovaĵoj en Usono, oni konstruis en Amazono grandegajn bovpastejojn. Tio ankaŭ detruis grandskale la praarbaron.

Evoluis liberĉiela ekspluato de oro. Por tio oni uzis grandan kvanton de hidrargo. Tio kaŭzis gravan hidrargismon.